# TEA-BULTENO

3ª JARO APRILO 2000 NUMERO 4

## AGENDO

| | | |
|---|---|---|
| 1 | S | |
| **2** | **D** | |
| 3 | L | |
| 4 | M | Ordigo de TEA-arkivo |
| 5 | M | |
| 6 | Ĵ | |
| 7 | V | Nia pasinteco en diapozitivoj |
| 8 | S | |
| **9** | **D** | |
| 10 | L | |
| 11 | M | Ordigo de TEA-arkivo |
| 12 | M | |
| 13 | Ĵ | |
| 14 | V | Kartluda vespero: Rumio! |
| 15 | S | |
| **16** | **D** | |
| 17 | L | |
| 18 | M | Ordigo de TEA-arkivo |
| 19 | M | |
| 20 | Ĵ | |
| 21 | V | Navigado interreta |
| 22 | S | |
| **23** | **D** | |
| **24** | **L** | |
| **25** | **M** | |
| 26 | M | |
| 27 | Ĵ | |
| 28 | V | Interŝanĝo de bild/poŝtkartoj el la tuta mondo |
| 29 | S | |
| **30** | **D** | |

*Bonan Paskon al Vi ĉiuj!*

## Freneza mondo

Oni diras, ke aprilo estas la monato de frenezuloj. Kaj la 1ᵃⁿ de aprilo oni kutimas ŝerce trompi, mistifiki la kredemajn homfratojn.

Estas denove aprilo. Ni povas al ni demandi: ĉu ni faru aprilan ŝercon? Unu voĉo en nia animo diras: «Faru, faru, ĉar ĝi estas ĉarma senkulpa kutimo.» Sed alia voĉo diras: «Kial fari? Ĉu vi ne vidas, ke la tuta jaro estas aprilo?»

Vere, se ni ĉirkaŭrigardas, ni devas konstati, ke la mondo freneziĝis. Ĉiu tago prezentas novajn aprilajn ŝercojn.

La okazaĵoj de la nuna tempo aspektas vere kiel ŝercoj. Sed alilanke ili estas kruelaj ŝercoj, ĉar pro ili milionoj da homoj suferas kaj pereas.

Ni rigardu kelkajn el tiuj modernaj tutmondaj aprilaĵoj:

La moderna tekniko donacis al la homaro admirindajn maŝinojn. La logika sekvo devus esti, ke la homoj estas pli liberaj, ili bezonas malpli multe labori, ol antaŭe. Sed kion ni vidas? La homoj devas eĉ pli multe labori, ol antaŭe kaj alia parto de la homaro povas malsatmorti. Grandioza ŝerco en tutmonda skalo.

La regantoj de la mondo kunvenis por senarmigi. Belega intenco! Kaj evidentiĝas, ke ĉiu ŝtato volas senarmigi – siajn najbarojn! Sed ne sin mem. Genia aprila ŝerco!

Ĉiu ŝtato febre klopodas eksporti siajn produktaĵojn al aliaj landoj kaj ricevi monon de ili. Sed samtempe rifuzas la reciprokecon. Klasika ekzemplo de aprilaj ŝercoj.

Milionoj da homoj malsatas. Kaj la lokomotivojn oni hejtas per kafo kaj greno.

Oni proklamis la principon: la popoloj estu liberaj kaj mem decidu pri sia sorto. Kaj kio okazas? La popoloj diligente realigas la principon – por si mem. Sed samtempe, ili, la profetoj de la libereco, senkompate subpremas la aliajn. Ŝerco, kvankam tre kruela.

Kaj tiel plu. Kaj tiel plu.

Ni, Esperantistoj, atentu ke ni ne plilongigu la liston per nia propra ŝerco: interna batalado en la "granda rondo familia". Ni klopodu, ke la teruraj ŝercoj ĉesu kaj revenu la regado de la racio kaj bonvolo. La ŝlosilon de la solvo la homaro jam ricevis en la perfekta regulo: «Kion vi deziras al vi


mem, tion faru al la aliaj.»

Ni komprenu kaj komprenigu al la aliaj homoj, ke la garantio de la propra feliĉeco estas en la kontenteco kaj feliĉeco de la aliaj homoj. La homaro ests unu tuto. Se unu parto malsanas, suferas la tuta korpo. Tial la inteligenta egoismo, kiu cetere estas natura kaj necesa, pensas ne nur pri sia propra bono, sed ankaŭ pri la bono de la aliaj.

La homaro devas vekiĝi el la deliro kaj ĉesigi la frenezaĵojn. Por aprilaj ŝercoj devas sufiĉi unu tago en la jaro.

## *Kvizo*

*En kiu jaro kaj de kiu estis skribita la supra artikolo? En kiu revuo ĝi estis publikigita?*
*Inter tiuj, kiuj ĝuste respondos kaj, krome kaj krone, aldonos la plej interesan komenton, estos lotumitaj premie tri Esperanto-librojn. La solvoj devas atingi la redakcion de TEA-Bulteno ĝis la 15ª de majo. Rezulto aperos en la bulteno de junio 2000.*



## Brazila Poŝto

aperigis plian poŝtmarkon kun Esperanta teksto. Lastjanuare eldoniĝis kvar poŝtmarkoj kun infandesegnaĵoj omaĝe al la jaro 2000. Sub la nomo «Selando o Futuro» (vortludo inter «Afranki» kaj «Determini» la Estontecon), la serio prezentas talonojn apud la poŝtmarkoj.

La 16-poŝtmarka folio (4x4) havas ok talonetojn kaj ĉiu taloneto prezentas la esprimon **VIVU 2000** en aparta lingvo. La taloneto kun esperantlingva versio prezentas la sunon kaj ĉielarkon. Entute nur sur du el ĉiuj talonetoj, tio videblas - kurioze, la alia estas tiu kun la angla "**HURRAH 2000**"!

Intenco aŭ koincido pri la "internaciaj lingvoj"? Ĉiuj aliaj talonoj estas iom palaj, kun blua ĉielo kaj kolombetoj aŭ steloj. La ceteraj lingvoj estas franca, germana, ĉina, hispana, itala kaj portugala, kompreneble. La Esperanto-talono estas ligita al poŝtmarko kun teksto **SÉCULO XXI - O RENASCER DE UM MUNDO FELIZ** (21ª jarcento - renaskiĝo de feliĉa mondo) kaj infano desegnis gravedulinon, kiu generas terglobon.

Bildon pri ĝi oni povas vidi en **www.esperanto.cc**

Ĉiu poŝtmarko mezuras 40x30mm kaj dentumoj estas 12x1,5. Eldondato estas la 1ª de januaro 2000. La valoro de ĉiu poŝtmarko estas R$ 0,22 + 0,08 (dudek du Realaj cendoj, la baza poŝta afranko por individuoj; la aldonaj ok cendoj el tiu eldono celos Nacian Infanan kaj Adoleskan Fonduson). La eldonkvanto egalas al 2 milionoj da poŝtmarkoj.

Laŭ informoj disponeblaj, ricevitaj de e-isto *Enir Garcia*, kiu havas rangan postenon en la Poŝto, ne li tion rekte influis. Verŝajne la uzo de Esperanto estis iniciato de iu en la Arta Departemento de la Poŝto mem, kio estas eĉ pli ĝojiga. Eble estus interese gratuli la iniciaton per korespondaĵo al:

Presidencia da ECT - SBN - Quadra 01 - Bloco A - Ed. Sede ECT - Brasília - DF - CEP 70002-900

Rete, por tiuj, kiuj scipovas (aŭ povas diveni) la portugalan - http://www.correios.com.br/Conheca_correios/fale_conosco/default.cfm

Esperenble, kiam submetiĝos (post unu jaro) peto pri poŝtmarko memore al la UK en Fortaleza, oni kalkulos eĉ je internaj aliancanoj en la ĉiujare ege disputata elekto de la sekvaj eldon-serioj de la Poŝto.

*Informis James Rezende Piton - james.piton@iname.com UEA-FD (Filatelo: Esperanta; aŭtomatigo: industria) en Campinas, Brazilo*



## Manifestacio en Udine Italio



En Udine, la 9ªⁿ de aprilo, okaze de la ekologia dimanĉo, la grupo **NOVA ESPERO FRIULI**, kunlabore kun la asocio **LEGAMBIENTE**, zorgos la plantadon de la tria arbo en la **ĜARDENO DE ESPERANTO**, en *via Pola*.

Post la ceremonio, kiu okazos je la 9.30 horo, sekvos vizito al ekspozicio *Itinerari Tessili* (Tekstilaj Itineroj), pretigita ĉe la muzeo de la urbo en la turo *S. Maria - via Zanon*.

Sekve, je la 12.30, ni kunvenos ĉiuj ĉe la **RISTORANTE ETNICO INDIANO** (Hinda restoracio), en *Vicolo della Banca 6*, por gustumi tipan menuon de tiu lando.

Tiuj, kiuj ŝatus partopreni en la renkontiĝo, bonvolu sin anonci al unu el la jenaj telefon-numeroj:

++39/432561020 - ++39/03387037606

aŭ rete al: Livandmar@iol.it

Ni atendas vin multnombraj, kaj eble ... ekestos ankaŭ surprizo!

## Via rideto plibeligas la mondon

Se vi ankoraŭ ne forgesis kiel rideti, ridetu do, kaj sendu tiun ĉi rideton aŭ eĉ ridetojn por nia internacia kolekto **LA MONDO DE RIDETOJ**. Vi ankaŭ povas inviti rideti kun ni viajn familianojn, parencojn, amikojn, kolegojn, najbarojn, hejmbestojn...

Partoprenante en nia plej serioza transnacia kaj translingva ridet-projekto, vi povos ne nur donaci al ni via(j)n rideto(j)n, sed ankaŭ sinprezenti al la internacia publiko, trovi novajn amikojn kaj diri aŭ deziri kion ajn vi volas al vizitontoj de la ekspozicio kaj de la fondota speciala muzea **HALO DE RIDETOJ**.

Do, prenu kaj ekspedu al ni via(j)n rideto(j)n en ajna ebla formo, laŭdezire: fotoj, desegnaĵoj, karikaturoj, pentraĵoj, perkomputilaj grafikaĵoj, printaĵoj, originalaj rid(et)igaj frazoj, ktp ktp. La aĝo de ridetontoj kaj la kvanto aŭ dimensio de viaj kontribuoj estas nelimigitaj. Via(j)n rideto(j) kiel eble plej baldaŭ sendu al:

**INTERNACIA MUZEO DE PACO**
Pk 76, UZ-703000 - Samarkand, Uzbekio
Rete: peacetur@samuni.silk.org

**BULTENO** de la membroj de
**TRIESTA ESPERANTO-ASOCIO**
**Sidejo**: Via Crispi 43 - 34125 Trieste
Tel/fakso: +39 040 763128
Reto: esperanto@retecivica.trieste.it; nored.@tiscalinet.it
**Poŝta adreso**: CP 601 - IT-34100 Trieste Centro - Italio
Poŝtĉekkonto N° 10834349